# EKO
Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

**Enhavo**


- UEA plue aktivas ĉe UN
- Greziljono persiste tra sia somero
- Gastonomio ĉe ILEI – kontribuu!
- Juristoj reaktiviĝas – FA-atingo!


Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-31 sendita el Budapeŝto, la 10an de junio*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## Agado ĉe Unuiĝintaj Nacioj pluiras

**Informilo 46 – majo 2020**

- UEA kunlaboras pri UN-enketo rilate minoritatojn kaj lingvajn rajtojn
- Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de Multflankismo, 24 aprilo 2020

Jen la plejlasta komuniko de la Novjorka Oficejo de UEA. Reklamata kaj disponigata angle, Esperante kaj france.

## Greziljono luktas plu



La franca Esperanto-Kultudomo en kastelo Greziljono informas vin, ke ĉiuj kursoj planitaj en julio ŝoviĝis al aŭgusto.

2020-julio-27/31 --- Verda Naturisma Semajno kun INOE kaj FFN

2020-aŭg-02/09 --- la Verdaj Skoltoj tendumas, skoltumas, lignokonstruas

2020-aŭg-03/13 --- 6-a Interŝanĝoj de scioj kaj faroj (franclingve)

2020-aŭg-03/14 --- 4-a **Maratona Esperanto-kurso** dum 7 ĝis 11 tagoj

2020-aŭg-10/14 --- 32-a Konferenco post OSIEK « Naturo, Medio, Klimato, Scienco »

2020-aŭg-17/27 --- 10-a **Festa Semajno** por infanoj, adoleskuloj kaj familioj

Aliĝoj : gresillon.org/aligho; Informoj : kastelo@gresillon.org

## Nia Jurista Faka Asocio pluvivas!

Estas granda plezuro informi pri la ĵusa apero en interreto de la nova TTT-paĝo de Internacia Jurista Esperanto-Asocio. IJEA estas la faka asocio de la E-movado kie

renkontiĝas tiuj kiuj laboras aŭ rilatas al juraj medioj. Se vi interesiĝas pri tiuj temoj ne hezitu viziti ĝin. www.esperantojuro.org

José María Rodríguez Hernández



## Lernu la arton de virtuala frandumado! ILEI vojaĝigas vin

La Estraro de ILEI invitas vin partopreni en nova por nia Ligo aranĝo – en **Gastronomia Rondo**! Tiu-ĉi evento okazos unuafoje en la historio de ILEI anstataŭ jam konata kaj ŝatata kongres-komenca Frandvespero.

Ni invitas vin "gustumi" virtuale tradiciajn manĝaĵojn de diversaj popoloj kaj naciecoj (sur la foto: la svisa ikono – fonduo). Amatoroj de kuirarto povas prezenti siajn talentojn en iu ajn formato: prelego, videofilmo, reta kurso, metiejo, gastronomia kvizo, manĝ-ludo ktp.

Temo de la prezentoj: kuirado de iu manĝaĝo, popolaj kuirartoj, manĝaj: tradicioj, surprizoj, interesaĵoj, amuzaĵoj ktp. Ekzemple filmu iun tipe tradician manĝon ĉe vi kun familianoj aŭ geamikoj kaj sendu ĝin al ILEI.

Maksimuma daŭro : 3 – 5 minutoj. Nepre komencu dirante vian nomon, urbon kaj landon. Montru kaj nomu la manĝaĵon en via lingvo kaj en Eo, la manĝmanieron, komentu la manĝaĵojn, originon de ili, kuirmanieron… en kiu okazo oni manĝas tion. Ni havos dum VEKI sesion, kie tiuj filmetoj sekvos unu la alian. Viaj aliĝoj bonvolu sendi al la adreso **ilei.sekretario@gmail.com** ĝis la 20-a de junio. Viaj kontribuoj devos atingi la Ligon antaŭ la fino de junio.

Vortoj: 380

===============

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/18. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.